

sub la suda kruco ★
septembro 2018

ESPERANTO



ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

Volumo 25[3] numero 132 septembro 2018

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio
Redaktistoj: Terry Manley, Joanne Johns
Provlegantoj: Vera Payne, Donald Rogers
Kontaktadreso | esk2@esperanto.org.au

AEA - ESK
G.P.O. Box 2122
Melbourne, Victoria 3001
Australia

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto sub la Suda Kruco estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au
NZEa | www.esperanto.org.nz – exec@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk2@esperanto.org.au

Limdato por kontribuoj por la sekva numero


15-a de novembro 2018

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj
en ĉi eldonaĵo respondecas la aŭtoroj.
Ili ne necese spegulas la opiniojn
aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2018 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 1038-9380.

SUR LA KOVRILO: EKDE TIAM - nova muzikgrupo de Melburno

- 
- 4.** Profesoro Ronald Gates
 - 6.** 2019 Somerkursaro en Adelajdo
 - 8.** ESK Intervjuas EKDE TIAM
 - 10.** Venontjara kongreso en Nov-Zelando
Vizito al la Acoroj (Azores) kun Esperantistoj
 - 12.** Fotoj de la 108a UK en Lisbono
 - 14.** La IJK per 16 lecionoj
 - 17.** Vizito al Balio
 - 19.** Vidi voĉojn
Aviadilo sen fenestroj
 - 20.** Frank Banham 1898-1974
 - 22.** Izolitaj homoj - Aŭstraliaj verkintoj en Esperanto
 - 26.** Ekskurso al la insulo 'Filo de Krakatoa'
 - 29.** Midaso
 - 30.** Sinteza Biologio

septembro, du mil dekok

Je Julio okazas nordaj Esperantaj renkontiĝoj. Kongresoj, kursaroj, ks. Kelkaj el niaj membroj ĉeestis la UK-on en Lisbono. Vidu la artikolojn kaj fotojn de tiuj ene.

Legante la libron de Bill Bryson - *Mallonga Historio de Preskaŭ Ĉio* - mi lernis pli pri Lisbono jene. *“Verŝajne la plej intensa tertremo registrita en historio, estis tiu kiu frapegis, kaj esence disskuis Lisbonon, Portugalujo je la tago de Ĉiuj Sanktuloj (Nov 1an) 1755. Antaŭ la deka atm la urbeo estis subite flankenpuŝata de frapego nun taksata je 9.0, laŭ la skalo de Richter. Lisbon estis ege tremigata dum sep minutoj. Kompare, la tertremo (7.8) en San Francisko en 1906 daŭris 30 sekundojn. En Lisbono post tri minuta paŭzo venis alia ŝokego kaj post du horoj la tria alvenis. Cunamo trafis la urbon kaj poste pro la skuado, kandeloj kiuj lumigis*

ĉambrojn kaj preĝejojn por la sankta tago, falis kaj kaŭzis fajrojn tra la urbo. Entute 60,000 mortis kaj ĉiu konstruaĵo detruigis. Terura okazo neforgesebla.”

Rigardante fotojn en la interreto oni konstatas, ke ne ĉiu konstruaĵo detruigis dum tiu katastrofo kaj multaj estis rekonstruitaj poste.

Esperanto-eventoj en la sudo ĝenerale okazas somere. Do en ĉi tiu numero de ESK estas informo pri la venonta AEA kursaro en Adelajdo kaj la NZEA kongreso en Velingtono. En Adelajdo somerkursaro okazos dum 9 tagoj kun Szabolcs Szilva el Hungario kiel gastinstruisto. Ankaŭ nova muzika grupo EKDE TIAM aperos. Do ne prokrastu, sendu vian aliĝilon nun al tiuj organizoj por helpi kun la tieaj aranĝoj.

Profesoro Ronald Gates

TERRY MANLEY (NOVSUDKIMRUJO)

Estis ia surprizo kiam mi legis en AE, ke Ron Gates mortis. Sed ne ŝokego. Dum la lastaj jaroj mi vizitis lin kelkfoje post mia translokiĝo al Armidale en 2006. Li loĝis kun edzino Barbara sur farmbieno (Wangarang) ne tre for de la urbo kaj ĝuis trankvilan vivon, ĝardenumante kaj prizorgante kelkajn gebovojn. Li ludis briĝon ĉe la loka klubo kaj ofte venkis. Li ankoraŭ verkis Esperantajn romanojn murdenigmajn en kiu la tereno de Armidale kaj la Universitato estas rekonebla. Li estis ĉiam afabla kaj bonveniga post kontakto, sed li ne ofte instigis la kontakton. Mi ĝuis tiujn renkontiĝojn. Li iam petis min kontrollegi la tekston de nova romano. Lastfoje kiam mi vidis lin li resaniĝis post operacio kaj ŝajnis sufiĉe bone. Mi bedaŭras, ke mi ne sciis pri lia morto sufiĉe frue por ĉeesti la funebran servon. Sed jen la sorto.

Emerita Profesoro Ronald Gates AO, mortis la 26an de Aprilo 2018 je la aĝo de ESK | paĝo 4 | 132 | septembro 2018



95. Li estis patro de kvar gefiloj kaj avo de ses genepoj.

Naskita en 1923 en Launceston,

Tasmanio Ron plenkreskiĝis en familio kun laborista patro. Liaj infanecaj jaroj estis por li iom ordinaraj, laŭ Ron “ŝirmitaj”. Li komencis universitatan studon en Hobarto ĉ. 1941 sed interrompis tion por aliĝi al la Aŭstralia armeo, malgraŭ ke li rajtis foresti por du kialoj. Unue, ke li estis dungato de la Impoŝta servo kaj due, ke li estis rekomendata per la Universitato pro supera klereco daŭrigi sian studon.

Dum 1942-44 li iris al la Norda Teritorio kiel soldato kaj verŝajne la sperto ne estis tre stimula ĉar je lia reveno al Hobarto li plenenergie sin aplikis al studado kaj aliaj interesoj. Konstatante, ke la registaro ofertis subteni ekssoldatojn por fini siajn studojn, li reiris al la Universitato de Tasmanio. Tie li starigis grupon de la Laborista Partio kaj prelegis ĉe la ŝtata konferenco de tiu Partio, li ludis pianon en ĵazmuzika grupo, li velboatis kaj remis sur la rivero Derwent, li aktoris en teatraĵo. Kaj ĉion tian li faris dum li studis kaj ekzameniĝis. Malgraŭ ĉio li gajnis altajn distingpoentojn en ĉiu ekzameno kaj tiel gajnis stipendion de Rhodes ĉe la Universitato de Oksfordo por plu studi pri ekonomiko.

En 1947 li iris al Anglujo por studi ĉe Oksfordo. En tiu tempo britoj ankoraŭ suferis limojn je manĝaĵaĉetoj same kiel dum la milito. La kolegejo ne estis hejtata kaj la vintro estis tre malvarma. Ron ne razis sin kaj lia barbo kreskis por iom konservi vizaĝovarmecon. Sed li ĝuis la ŝancon viziti Eŭropon. En la somero li iris al Ĉeĥoslovakio. Li kelkfoje iris al Francujo. La ŝancon vojaĝi en tiaj kulturoriĉaj landoj li ŝatis.

En 1948 li hejmeniris al Tasmanio, redungiĝis kun la Impoŝta Servo kaj kunverkis dummilitan historion de tiu departemento. Pro tiu eldoni li ricevis laboron kiel lekciisto ĉe la Universitato de Sidnejo kie li progresis al posteno de adjunkta profesoro. Lia posta laboro estis ĉe la Universitato de Kvinslando, kie li estis Prezidanto de la Profesia Fakto de tiu

universitato.

Profesoro Gates estis Vickanceliero de la Universitato de Nova Anglujo (UNE) inter 1977 kaj 1985. Dum tiu periodo li devis alfronti la malpliigon de budĝeto farita de la registaro de Fraser post la pli liberaj jaroj de la registaro de Whitlam. Kiel ekonomikisto li tre taŭgis en tia posteno.

Dum lia eminenta kariero li distingis sin jene: Ano de la Rockefeller Fonduso por Sociaj Sciencoj (1955); ricevanto de vojaĝsubteno de la Carnegie- Korporacio (1960); Ano de la Akademio de Sociaj Sciencoj de Aŭstralio, de la Reĝa Aŭstalia Planinstituto, de la Ekonomia Societo de Aŭstralio kaj Nov-Zelando (Prezidanto inter 1969-72); asociano de la registaro de Papuo-Nov-Gvineo (1970-73); supera ekonomia konsilisto por azia regiono de la Unuiĝintaj Nacioj (1970-73); komisionano de registara esploro pri malriĉeco, Kanbero (1973-77); patrono por la centjariĝo de Esperanto 1987; kaj prezidanto de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (1998-2001).

Pri tiuj lastaj du honoroj Ron klarigis, ke Ralph Harry petis lin fariĝi patrono en 1987 kaj li akceptis. Sed li pensis, se li patronos tiel li devos iom lerni la lingvon. Farinte tion li ekŝatis la lingvon kaj dume li legis kelkajn detektivajn romanojn. Poste li pensis, eble mi povos verki ion similan. Li verkis ses romanojn; ĉiuj estis murdenigmoj. Li ankaŭ verkis 3 romanetarojn kun la sama temo. Flandra Esperanta-Ligo eldonis tiujn.

En 2000 Ron kaj Barbara alvenis al la AEA-a somerkursaro kaj Aŭstralia Nov-Zelanda kongreso en Sidnejo. Tiam li estis prezidanto de AEA. Li redaktis la bultenon dum tiu okazo kaj estris ĉe la jarkunvenoj kaj oficialaj aferoj. Mi estis LKK-ano kaj Ron faciligis mian taskon. Li estis helpema kaj ege kapabla en ĉiu tasko kiun li entreprenis.

2019 Somerkursaro en Adelajdo



INSTRUISTOJ



**FRANCISKA
TOUBALE**

Pri mia antaŭa instruado mi povas diri ke kiam mi emeritiĝis en 1992 unu el la celoj estis ke mi povu instrui Esperanton sub la gvido de mia instruisto Clément Martin. Mi jam havis ideon kiel instrui lingvon ĉar mi estas profesia instruisto de lingvoj, sed mi bezonis profundigi mian konon de Esperanto.

Mi instruis en Rennes (Bretonujo-Francujo) ĝis mia alveno al Aŭstralio en 1996.

Mi gvidis ĉiusemajnan kurson en Melburno ĝis 2007 aŭ 2008, mi ne certas pri la dato. Ekde 2013 mi ree regule instruas en Knox kadre de la universitato de la tria aĝo.

Mi instruis mallonge en intensivaj kursoj ekzemple:

- en la somerkursaro de AEA en Melburno, Adelajdo, Perto, Sidnejo, Brisbano;
- en Nov-zelando, Vjetnamio, Nepalo, Indonezio;
- en Francujo kadre de la Pluezekaj

Renkontiĝoj;

• Mi regule korektas taskojn de lernantoj de Esperanto per la reto.

Krom instrui mi ŝatas ankaŭ muziki, kanti, danci, praktiki militan arton “aikido” kaj teatrumi. Mi estis membro de la Melburna Franca Teatra Kompanio (MFT) kaj ofte teatrumis en Esperanto-aranĝoj. La lasta fojo estas en Gimpo, apud Seŭlo, kadre de la SAT-kongreso kune kun la serba aktoro Sas’a Pilipovic’.



TREVOR STEELE

Mi ne povas kalkuli la nombron da kursoj, kiujn mi donis ĉe kongresoj/someraj lernejoj. Mi komencis en 1973, kaj ĉiufoje, kiam mi estis en Aŭstralio, mi instruis. Ankaŭ mi multe instruis en Pollando kaj Litovio.

Trevor naskiĝis en norda Kvinslando. Li iris kiel instruisto al Germanujo en la 1960a jardeko, sed lia laboro tie estis ĉefe kiel socialhelpisto al eksmalliberuloj.

En 1970 li instruis la gemanan en Anglujo kaj en Londono li komencis lerni Esperanton. Li poste instruis la anglan en Hispanujo kaj refoje iris al Germanujo antaŭ ol reveni al Kvinslando por instrui. Trevor agadas multe en Esperantujo. En 1977 li kun edzino iris al Bona Espero en Brazilo kie ili laboris. Inter 2002-2004 li estis ĝenerala sekretario de UEA. Li multe verkis en Esperanto. En la ligilo malsupre oni legas ke li verkis almenaŭ 15 librojn. Kiel li mem menciis, li multe instruis en multaj landoj. Mia unua instruistino Marie Mueller lernis de Trevor en Brisbano. Do

en iu senco, danke al Trevor mi lernis Esperanton. -Red.

Legu en Vikopedio pri li.
https://en.wikipedia.org/wiki/Trevor_Steele



SZABOLCS SZILVA

Mi nomiĝas Szabolcs Szilva, mi estas hungaro loĝanta en Varsovio, Pollando. Mi ekkonis Esperanton pere de reta kurso en 2007. En 2009 mi partoprenis en

mia unua E-araĝo, en la 2a Somera Esperanto-Studado en Slovakio. Ekde tiam, kiam ajn mi povas, mi instruas. Mi estas bakalaŭro pri turisma ekonomio, mi skribis mian diplomlaboraĵon pri Esperanto-turismo. En la studjaro 2010/2011 mi partoprenis Instruistatan Trejnadon gvidatan de Ilona Koutny, Katalin Kováts kaj Zsófia Koródy en la Universitato Adam Mickiewicz en Poznań, Pollando. En la sama loko mi finis ankaŭ la tri-jarajn Esperantajn Interlingvistikajn Studojn en 2014. En la jaro 2015 mi finis magistratajn studojn pri finnugra filologio en la Varsovia Universitato. Ekde 2015 mi estas studento de doktoraj studoj de finnugra filologio en la Varsovia Universitato. Dum miaj doktoraj studoj mi agnoskis kaj enkondukis la studobjekton Esperanto al la oficialaj kursoj de la universitato, mi ankaŭ gvidis la studobjekton. Mi partoprenis multajn sciencajn konferencojn, kie mi prelegis aŭ post kiuj mi publikigis artikolon.

Mi instruis Esperanton ankaŭ en kursoj en Mazara del Vallo (Italio) kaj instruis dum kelkaj tagoj en

Slovakio, Pollando, Israelo, Germanio, Nederlando, Belgio, Italio, Hungario. Mi gvidis 4-foje kursojn dum Somera Esperanto-Studado.

Dume mi pliedukiĝas. Mi sukcese partoprenis la trejnadon "Iĝu trejnisto de TEJO" en 2017 kaj gvidis plurajn porinstruistajn sesiojn en Italio plurfoje, en Pollando, en Francio kaj Slovakio. Mi ankaŭ kelkfoje ĉiĉeronas aŭ ĉefe tradukas ĉiĉeronojn al Esperanto. Tiel okazis en Internaciaj Junularaj Semajnoj en Hungario, dum Universala Kongreso en Islando kaj espereble denove en Universala Kongreso en 2019 en Finnlando. :)

Krom Esperanto kaj miaj doktoraj studoj, mi havas ankaŭ multajn aliajn okupojn: mi havas mian propran, etan lingvan lernejon kaj tradukfirmaeton kun la hungara, la pola kaj Esperanto. Mi kelkfoje testas lingve komputilajn ludojn. Kelkfoje mi partoprenas filmregistradon, kie mi interpretas inter la hungaraj aktoroj kaj alilandaj filmfarantoj. Kelkfoje mi voĉregistas la hungaran aŭ Esperanton en Varsoviaj studioj kaze de bezono.

Resume: lingvoj estas mia vivo!



La enirejo de Seymour College

ESK Intervjuas EKDE TIAM

speciala gasto en Adelajdo 2019



Kiuj vi estas? Kion vi faras?

Ni estas Ĝo kaj Petro de Melburno - kune ni estas EKDE TIAM! Petro ludas la tamburon kaj mi kreas ĉiujn aliajn sonojn per komputilo kaj kantas. Ni ambaŭ estas parto de la kreado de kantoj; la kernon kaj la tekston kreas mi, kaj Petro multe laboras pri aranĝado, miksado ktp.

Kiom longe vi estis en EKDE TIAM?

Ni eklaboris pri la unua kanto frue en 2017, sed ni havis sufiĉan tempon forte labori ĝis 2018.

Kian muzikon vi ludas?

Ni ludas alternativan sintez-popon en Esperanto, tamen ni ofte vagas iom for de tio. En unu kanto mi eĉ repas!

(repo -la nomo devenas de la angla Rap kiu estas mallongigo de "rimo kaj poezio" angle Rhyme And Poetry. -Red.)

Kiajn defiojn vi trafis verkante en Esperanto?

La vortoj kiujn mi volas uzi estas ofte tro longaj. Kaj kutime miaj unuaj pensoj por teksto estas en la angla, do mi devas halti kaj rekomenci Esperante. Sed vere, freŝa verkado ne estas tiel malfacile - la malfacileco venas kiam oni decidas traduki anglan kanton en Esperanton. Mi verkis plurajn kantojn por pasinta bando sed estis por mi tro malfacila tasko bone traduki ilin, do ni simple verkis ESK | paĝo 8 | 132 | septembro 2018

novajn kantojn en Esperanto.

Kia muziko influas vin, kio influas vian verkadon?

Preskaŭ ĉio influas nin, kiam ni bezonas inspiron. Ne nur muziko sed la ĉiutagaj sonoj ĉirkaŭ nin, kaj okazaĵoj en niaj vivoj kaj en la novaĵo. Ekzemple, unu el niaj kantoj evoluigis de nia penado instrui al mia patro rudimentaĵon de tamburistoj. Alia estis amkanto kiu ŝanĝiĝis kiam mi aŭdis pri la seksperforto kaj murdo de juna virino kiu trapasis parton de sia lasta vespero en nia strato.

Mi aŭdas ke vi baldaŭ eldonos albumeton-ĉu tiuj kantoj estos parto de ĝi?

Jes, ni celas eldoni 4-kantan albumeton antaŭ la fino de la jaro, kaj ambaŭ el tiuj kantoj estos inkluzivitaj.

Kie homoj povas aŭdi vin?

Ni ludos ĉe la kongreso en Adelajdo en Januaro - do certe venu al tio! Se vi volas aŭdi nin antaŭ tiam, sekvu nin ĉe la sekvaj lokoj por aŭskulti unu kanton, kaj scii kie aliloke ni koncertos:

Facebook: <https://www.facebook.com/ekdetiam>

Instagram: <https://www.instagram.com/ekdetiam/>

Twitter: <https://twitter.com/ekdetiam>

Soundcloud: <https://soundcloud.com/ekdetiam>



AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO

kongreso de esperanto
kaj somerkursaro

ALIĜU NUN ĈE

[HTTP://AEA.ESPERANTO.ORG.AU/KONGRESO](http://AEA.ESPERANTO.ORG.AU/KONGRESO)

ADELAJDO

4-13 Januaro, 2019

LERNU ... ESPLORU ... AMIKIĜU

speciala gasto

EKDE TIAM

Venontjara kongreso en Nov-Zelando

DAVID RYAN (WELLINGTON)

La venontjara nacia kongreso de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa) okazos en Wellington dum la 26-27 de januaro 2019. Somero estas bela sezono en Wellington kaj ni ĉiam diras ke 'ne ekzistas pli bona loko ol Wellington dum somera tago'.

La kongresejo estas Weir House, studenta loĝejo apud la universitato. Tiu loko estas tre bela kaj dum universitataj ferioj ofte okazas tie diversaj kongresoj. NZEA eĉ kongresis tie plurfoje kun multa sukceso. Se vi volas, vi povas mendi dormĉambron je via propra kosto. Vidu www.victoria.ac.nz/weirhouse. Se ne, Weir House troviĝas preskaŭ en la urbcentro kie estas multaj hoteloj.

Dum la kongreso okazos la oficiala jarkunsido de NZEA, prelegoj, distraĵoj



Oriental Bay, sunplena plaĝo en la urbcentro de Wellington

ktp. Ĉiuj partoprenantoj estas bonvenaj.

Por pliaj informoj: info@esperanto.org.nz. Vidu ankaŭ nian belan, renovigitan retpaĝon: www.esperanto.org.nz.

Vizito al la Acoroj (Azores) kun Esperantistoj

HEATHER HELDZINGEN (MELBURNO)



Kun 16 aliaj Esperantistoj mi vojaĝis al Ponto del Gardo, la ĉefurbo de Sankta Maria en la insuloj de Acoroj aŭ Azoroj (Portugalujo). La insuloj, sen homoj kiam la portugala navigantoj malkovris ĝin en la 15a jarcento, situas en la Atlantika Oceano 1500 km de Lisbono kaj 3900 km for de Nordameriko. La insularo estas formita de

naŭ insuloj de vulkana origino, kiuj difinas tri geografiajn grupojn.

La ĝusta dato de la malkovro de la Atlantikaj insuloj ne estas klara, kvankam historiaj raportoj indikas, ke la insuloj de Sankta Maria kaj Sankta Miguel estis la unuaj esti malkovritaj de la naviganto Diogo de Silves ĉirkaŭ 1427. La unua mapo kiu montras la Acorojn estis la Medici-Atlaso (1351). Ekde 1440, setlejoj disvolvis laŭ la riveraj valoj kaj marbordoj de Sankta Maria, Terceira kaj Faial. Multaj fontoj de trinkebla akvo kune kun fekunda vulkana tero igis la insulojn allogaj kaj facile koloniigaj.

La kolonianoj disvastiĝis laŭlonge de la marbordo en areoj kie kondiĉoj kaj

agrikulturo estis plej bonaj. La fekundeco de la Acoroj kontribuis al ĝia populara ekspansio, ĉar la insuloj baldaŭ eksportis tritikon al la portugala garnizono en Nordafriko kaj sukeron el kano kaj tinkturo al Flandrio. Poste oranĝoj kreskis kaj eksportiĝis al la Britaj Insuloj. Multaj fruaj kolonianoj estis portugalaĵaj sefardaj judoj, kiuj forkuris la inkvizicion en kontinenta Portugalujo. Laŭlonge de sia historio, ĝi spertis prosperon, piratadon kaj revolucion.

Kvankam la Acoroj aspektas tre verdaj kaj kelkfoje sovaĝaj, la vegetaĵaro estis ekstreme ŝanĝita. Granda parto da ĝi



Tipa strato en San Miguel

estis forigata en la pasintaj 600 jaroj pro ĝia valora ligno (por iloj, konstruaĵoj, ŝipoj, fajra ligno, ktp) kaj por liberigi terojn por agrikulturo. Oni kalkulas ke pli ol duono da insektoj en la insulo malaperis aŭ fariĝos formortinta. Sekve, iuj entrudemaj plantoj plenigis ĉi tiujn dezertajn terojn. Hortensioj estas alia herbaĉo, sed ilia minaco estas malpli serioza. Malgraŭ la fakto, ke hortensioj estis enkondukitaj el Usono aŭ Azio, iuj loĝantoj konsideras ilin simbolo de la insularo kaj plantas ilin laŭ vojoj, helpante la plantojn eskapi al la sovaĝejo.

Multaj farmbienistoj uzas ilin kiel barilojn ĉar bovoj sentas ke ili estas toksaj plantoj kaj ne alproksimiĝas ilin.



Nun la Acoroj estas fama pro ĝia agrabla vetero kaj spektaklaj scenoj allogantaj turistojn el la tuta mondo.



Nia grupo havis la oportunon viziti Sete Cidades, vilaĝo ene de vulkana kratero, kie enestas ankaŭ kelkaj lagoj, el kiuj elstaras la blua kaj la verda. El la rigardejo Pico do Carvão ni havis nekredeblan vidon al la norda kaj suda marbordoj, kaj ankaŭ al la centro de la insulo. Ni vizitis ananasplantejon kaj teplantejon, Gorreana, la plej malnova daŭre funkcia tea entrepreno en Eŭropo. Sekve ni vizitis la Ĝardenon Terra Nostra, konsiderata esti unu el la plej belaj en la mondo. Per ŝipo ni vojaĝis serĉi delfenojn kaj balenojn. Ni vidis multajn delfenojn kaj tri balenojn, do sentis tre feliĉaj kaj bonŝancaj.

Finfine ni flugis ree al Lisbono por la 103a Universala Kongreso kaj semajno de amikeco, amuzeco, muziko kaj bela atmosfero.

Fotoj de la 108a UK en Lisbono

SANDOR HORVATH KAJ
HELEN PALMER



La fama tramo 28 en Lisbono.
Nekredeble, kie ili konstruis tramliniojn en Lisbono. Tre turista, tamen valoras rajdi ĝin.

Alfabeto por nuntempaj infanoj

Alphabet taught to kids nowadays



El la prezentado de Peter Balasz pri alia edukado. Eble, li povas Skajp-prelegi dum nia venonta somerkursaro en Adelajdo dum januaro 2019



La fama grupo "Kajto" kantas

ESK | paĝo 12 | 132 | septembro 2018



Portugalaj dancoj dum la Nacia Vespero. La salono serioze grumblis kiam la grupo komencis klarigi la unuan dancon en la angla. Finfine la klarigisto uzis la portugalan



Bone revidi malnovajn amikojn. Sandor kun Carlos el Hispanio kaj Damir el Kroatio



Nia Heather kun regula, fidela aŭskultanto de ZZZ el Brazilio



La "gravuloj" dum la komitata kunsido



"Patro kaj filino kantas"
Kortuŝa kantado de Georgo Handzlik kune kun sia filino



Kompreneble, ankaŭ Jomo Ĉeestis kaj dancigis la kongreson



Maldekstre: Pensiga afiŝo sur muro en Lisbono
Dekstre: Serioza turistado en Lisbono



Jes. ankaŭ Johnny M Ĉeestis



Ĉarma renkonto kun hispananoj en ilia luita apartamento



La intertempa tradicia piedpilka maĉo inter esperantista kaj loka teamoj.

Bonega etoso Kaj por mi la unua fojo aŭdi nian himnon je la komenco de maĉo.



Tipa kongresa foto

La IJK per 16 lecionoj

MARIE ELLIOTT (AUCKLAND)



Juneco. Festo. Amikeco. Ke ĉiuj tiaj aferoj estos ĉe la IJK, mi supozis kaj esperegis. Kaj certe ne dubu, ke tiel estis! La IJK estis plene da neforgeseblaj okazoj kaj amikoj, kaj laŭ, ne nur mi, tute mojosegis*. Sed tiu ĉi rakonto ne estas pri nur festaĵoj kaj prelegoj - estas ja duparta afero. Unuflanke estas la koncertoj kaj interesaj prelegoj, la dancado kaj la amikumado. Aliaflanke, jen la klopodo aranĝi kaj skribi, la kunsidoj kaj la neceso labori. Kiel ulo preskaŭ nur partoprenanta, mi pensis, ke tiu serioza flanko estos tute kovrita. Sed, ŝajne ne (pro mia kulpo mem!). Mi ne mensogu aŭ kaŝu aferojn de vi, leganto. Do, pretigu teon, trinku kaj sidiĝu, ĉar mi nun rakontos pri ĉiu fuŝa sperto kaj ĉiu festa emo, por ke vi eble lernu pli ol nur la direndajn vortojn, "Iru al la IJK"!

(*mo-jo-so Moderna Juna Stilo -Red.)

1a tago: La interkonado

Eĉ dum la flugo al la IJK mi amikon trovis. Post pli ol unu tago restante en aviadiloj, finfine mi atingis la Lisbonan flughavenon. Ondo da varmegeco ĉiam min repelis internen, sed finfine mi sufiĉe kuraĝis simple iri trovi la buson. Dum la karavana vojaĝo, mi renkontis kelkajn kaj parolis al komencanto el Germanio. Kaj

indas diri, ke la kanto Dek Bovinoj estas de ĉiuj konata. Sufiĉe noktis kiam ni finfine atingis la kongresejon, do mi preskaŭ tuj enlitiĝis.

1a leciono: Ne. Ne ĉiu mondano parolpovas la anglan.

2a tago: Kulturkonigi

Ekde mi vekiĝis, mi maltrankviliĝis. Estos mia prelego, kaj mi ankoraŭ ne ĝin finis! Eĉ ĝis mia veturado al la flughaveno mi strebis fini la prezentaĵan parton. Sed la vivo kiel laborhava studento estas kelkfoje tro okupata teni. La verkadon mi ja finis, sed ankoraŭ ne tradukis kelkajn gravajn vortojn. Kaj post ĉio, mi eĉ ne havis la tempon praktiki ĝin! Iu agrable donis sian komputilon uzi, kaj dum preskaŭ la tuta tago mi ade laboris. Finfine, kiam mi prelegis al ĉirkaŭ 15 homoj... estis iom fiaske. Mi donis multan informon. Mi montris multajn bildojn. Kaj ĉion mi faris kun gramatikaj fuŝoj, eliziaĵoj, kaj malfluaj partoj. Eble unu horo kaj duono tro sufiĉis, malgraŭ la fakto, ke estis multe pli diri!

2a leciono: Ĉiam faru tion, kion oni promesas fari.

3a leciono: Ĉiam promesu nur tion, kion oni povas fari.

Krom tio, mi finfine unuafoje en mia vivo aligatoris Tokipone (alia artefarita lingvo) vizaĝ-al-vizaĝe kun iu.

Estis ankaŭ kultura kaj lingva festivalo en la urbo, al kiu mi alportis iom da Novzelanda ĉokolado, ĉar kial ne? Mi diru la tialon, pri kial ne. Estis varmege. Krom mia ĉokolad-"trinkaĵo", estis multege da interesaj manĝaĵoj kaj montraĵoj el multaj kulturoj, aranĝitaj kiel bazaro. Kaj dume, estis mojosa koncerto de Martin Wiese. Vere bunta, amuza dua tago!

4a leciono: Varmeco kaj ĉokolado ne bone intermiksiĝas.

3a tago: La Steloj Neatingeblaj

Dum la komenco de la IJK, mi kaj aliaj rigardis la timigecon de unu tre ofte uzata kaj nokte malluma koridoro. Perfektus por horora filmeto! mi pensis. Do, mi kreis mense ekskurzojn resti ĉe la kongresejo dum kelkaj iris urben por trovi helpantojn. Kaj ja estis! Kiam mi trovis interesitajn homojn, mi eĉ pli volis krei la filmeton. Sed ja sciis, kara leganto, ke estis la komenco de granda fuŝego!

Krom tio, mi ludis lernludon pri la ŝatokupoj de aliaj homoj, kaj skote dancis. La ok-figuro inter tri homoj estis ege amuza fari, pro la fakto ke ŝajne neniuj povis, kaj iris tien kaj reen kun ĝojo kaj konfuzeco. Kaj eble tiun tagon, mi rekontis ulon de la komitato de TEJO. Ri (ĉar mi ne donu tro da informo) plendis la duhoran kunsidon ĉitagan, sed tio ja necesis pro ega strukturŝanĝo. Estis la unua fojo dume, ke mi pensis pri komitataj aferoj, kaj havis lecionon pro tio kaj pro kelkaj aliaj aferoj de la kongreso.

5a leciono: La bona, strikta aranĝado de oniaj aferoj estas grava por la kapablo kunagadi.

6a leciono: Sed ĉu ja ĉio indas tiel strikte estu, ho??

La fina afero de la nokto por mi, estis iri vidi la stelojn brilantajn. Estis unu problemoj pri tio: La steloj apenaŭ brilis. Simple estis tro da lumiloj. Sed estis kelkaj videblaĵoj, kaj mi ĝuis la promenadon.

7a leciono: Por ke stelo brilu, mallumo vivu.

4a tago: La Ombro kaj La Lumo

Ekskurso! Amuzo! Aventuro! Mi iris al Merida, Romia vilaĝo, por ke mi mem vidu iom da klasikaj artaĵoj kaj konstruaĵoj, kiujn mi studis en la altlernejo. Dum preskaŭ la tuta ekskurso, mi elektis iun, pli-malpli sekvi tiel, kiel ombro sekvanta la lumon. Mi

ne promenu sole sen iu por kunbabili! (Nu, ja ne estis hommalplena ekskurso, sed...) La elektita estis mojosulo, kaj mi pensas, ke ni bone amikiĝis. Nia grupo vidis kolonojn kaj statuojn kaj stadionon kaj kriptojn, kaj tiel plu. En muzeo, mi fine decidis sole iri al alia kripto pro iom da aventuremo. La fina afero estis iri al lago, kaj tie mi naĝis eĉ kiam mia sekvato ne naĝis. Eĉ ne naĝis! (Nu, ŝajne mi simple malfruis.) Dum tiu ekskurso, mi lernis multon kaj ĝuis multon. Kaj pro tio, mi havas konsilon.

8a leciono: Ne manku al oni apudulo por ĝui kune la vivaventuron.

9a leciono: Manku al oni apudulo se oni ne ĝuus kune la aventuremon.

En ĉi tiu parto, jen la komenco de la eble plej ega fuŝo de mi mem ĉe la IJK. Mi volis, eĉ volegis, krei hororan filmeton. Ankaŭ kelkaj aliaj volis. Mi verku la rakonton ĉinokte, mi pensis. Kaj ve, ve al tio!

5a tago: Strebado sen Amuzo

Ho, birdoj! Mi ŝatus vidi tiujn! Sed, ve, mi aranĝis la aktistaron.

Nu, eble filozofio? Kaj mi devas iam lerni ludi Go-on. Sed ve, mi verkadis la scenaron.





Programero pri 'Dio de Militeco', unu el miaj plej ŝatataj ludoj? Ne plu okazis.

Okej, okej, finfine mi dancu mezepoke. Sed ja ne plene pretis la scenaro, kaj mi devis komunikadi kun la aktistoj. Eĉ ne iris mi vidi la teatraĵon Utopio. Kaj kiam estis la tempo por karaokeo, la iloj sufiĉe fuŝiĝis, ke se mi irus, mi kantus tro malfrue, eĉ matene.

Eble mi serĉis ian gloron? Eble la volo kunagadi blindigis min al la fakto, ke ĉiu programero jam estis kunagada afero? Aŭ eble, eĉ for de mia lando kaj laboro mi iel sentis la devon interne labori, labori, labori senĉese? Iamaniere, mi ne iris al io ajn. Pli gravas la protiritaj aferoj.

10a leciono: Neniam laciĝu, penadu fini farendaĵojn.

11a leciono: Konu tion, kio vere estas farendaĵo.

6a tago: Nenio el Ĉio kaj Ĉio el Nenio
Fine la tago. Ĉiuj pretis filmi. Kaj ekde la matenmanĝo, okazis fuŝaĵoj de tie, de ĉi tie. Homoj mankis. Lokoj supozeble taŭgaj, ne taŭgis. Tien kaj reen iris la dediĉintaj, kaj eĉ kiam la mankantaj roloj estis pli-malpli plenigitaj (post iom da reverkado), finfine mi perdis la celon. La tuta hieraŭa tago min apenaŭ amuzis, kaj eĉ kiam ni povis filmi ion, vere ne estis, kiel mi ĝin konceptis. Kun bedaŭro mi nuligis la projekton. Tro malfruis, tro da laboro por ĉiuj. "Eble venontjare", amiko diris al mi, kaj pro tiu stulta sorto, mi sufiĉe feliĉe trovis ian lecionon.

12a leciono: Sekvu oniajn ideojn ĝis la fin'.

13a leciono: Bonsciu la tempon, kiam oni sekvu. Bonplanu oniajn ideojn. Bonkonservu onian energion por nur la sekvindaj.

Post ĉio, nenio okazis. Kaj, de nenio, ĉio okazis. Ekde mi kore konis, ke mi ne ĝuis sufiĉe la aktivaĵojn, mia samĉambrulo invitis min naĝi en la naĝejo - eĉ tion mi ne faris antaŭe! - kaj kun ĝojo mi iris. Tie, la sekva okazis. En la naĝejo, mi renkontis iun tre amuzplenan, ŝerceman. Kun tiu mi dancis ĉe la koncerto, ĉe la dancejo, eĉ trinkis iomete (kaj nur iomete!) kaj dancadis ĝis la nokto nokto fin' (aŭ la 3a atm). Estis mia vere unua fojo fari ion ajn tiel, kaj mi ege ĝuis la okazon.

14a leciono: Faru ion novan. Ĝuu sen timeco. Dancu ĉiam de la koro.

15a leciono: Ho ve, konu la limojn de onia korpo!

7a tago: Fina Tago kun Doloro

Mi vekiĝis iel je la 8a kaj duono, malgraŭ la dancada nokto. Por la fina tago de programaj aferoj, mi iris unue al 'Logiko'. Iris, kaj estis la sola partoprenanto por tiu reokazo! Do, agrablan kaj interesan parolon mi havis kun Granda Filozofo. Tiu memorigas min nun pri ĉi tiu afero: Kio estas Esperantisto sen espero? Kaj, unu plia paŝo: Kio estas Esperantisto kiu ne age kaj kuraĝe realigas tiun esperon en la vivon? Certe dum kaj post la IJK, mi pli sentis la emon agadi, iel, iam.

Post la tagmanĝo estis interesege prelego pri ĉifromono kaj la ebleco havi propran valuton en Esperantujo. La ulo, kiu prelegis, bone konis la temon. Malgraŭ la fakto, ke mi ne bone scias, kiel funkcias la ekonomion, mi ja lernis multon (ekzemple, mi ne investu en bitmonon iam ajn fruestontece!).

Ripozo. Folkloro dancado. Naĝado. Vespermanĝo. Kaj finfine, la koncerto de Jonny M. Nur kelkaj vortoj... Tiel ege

mojose! Mi dancadis (malgraŭ korpodoloro), kaj poste tro lacegiĝis kaj iris litten. Mi volis fari same kiel dum la hieraŭa nokto, sed ja ne povis. Estis unu grava problemo pri tio, ke mi ankoraŭ ne sufiĉe “guis la nokton” aŭ, aliavorte, feste ĉiun adiaŭis. Kaj la rezulto de tio estis alia, nekorpa doloro. Kial tiu sento enkaptas mian koron, mian menson? Kial forŝirota estas la ligo inter amikoj? Estis ja la fina nokto. Kaj pri tio, mi povis fari nenion.

8a tago: Adiaŭ, Kara IJK

Dum la tago komencis, miaj samĉambruloj jam forestis. Tute sola mi vekiĝis, kun doloro ankora. Malplenaj tabloj en la manĝejo, neniuj restantaj en la

kutimaj babilejoj - tiu ĉi donis al mi sufiĉe da informo. Estis kvazaŭ kunveno apud la enirejo, kaj valizoj restis disde inter la tabloj. Homo post homo diris “ĝis!”, sed ĉu ja ĝis iam ajn? Ĉu mi en mia tuta vivo vidus ilin venontfoje?

Mi aĉetis tiel malfruan busbiletan. Do esperante rekunveni kun iu, mi reaĉetis pli fruan. Aĉetis, sed ja tro rapide mi kaj miaj amikoj disiĝis. Kaj kiam mi atingis la flughavenon, mi eĉ ne trovis la aliajn. Tiel mi flugis hejmen.

Adiaŭ, IJK!

16a leciono: Estas ĉiam ŝanco saluti oniajn amikojn; estas nur unu ŝanco vere adiaŭi.

Vizito al Balio

DAVID RYAN (WELLINGTON)

En julio mi vizitis Balion por la unua fojo por ferii kun mia familio. Balio estas facile atingebla loko per rekta flugo el Auckland (naŭ horojn) kaj diversaj aŭstraliaj urboj.

En Nov-Zelando kiam oni mencias Balion oni ofte pensas pri junuloj kiuj nokte volas aĉeti malmultekostan bieron kaj amuziĝi en trinkejoj kaj tage sunbruniĝi sur plaĝo en postebria stato. Balio estas feliĉa, sunplena, festa insulo kaj ni certe vidis tiun aspekton de vivo en Balio, sed ni ankaŭ vidis tre belan kamparon kaj religiajn procesiojn kaj ceremoniojn.

Ne estas surprizo ke Balio estas populara feria loko pro la fakto, ke ĝi estas tre malmultekosta. La kosto de hoteloj, manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, transporto ktp estas tre malalta. Ekzemple, ni luis aŭton kun ŝoforo por taga ekskurso kaj ni devis pagi nur \$70AUD! Pri transporto mi devas mencii, ke estas TRO da motorcikloj kaj aŭtomobiloj. Malfeliĉe, ni pasigis multajn horojn senmove en



Bela plaĝo

trafikŝtopiĝoj.

Do, kion vidi kaj fari en Balio? Plaĝojn, rizkampojn, vulkanojn, masaĝojn, kaj milojn da temploj. Kvankam la plej multaj indonezianoj estas islamanoj, en Balio la ĉefa religio estas la hindua kaj oni vidas grandajn templojn ĉie.

Pro la fakto ke multaj turistoj venas el Aŭstralio kaj Nov-Zelando, la angla estas la lingvo plej ofte uzata en turismaj lokoj, kvankam ni ankaŭ aŭdis la ĉinan, japanan, kaj eĉ la rusan. Tamen, la indonezia lingvo estas relative facila. Mia opinio, el la lingvoj kiujn mi scipovas, ĝi estas la plej facila post Esperanto.

Oni nur devas lerni novan vortstokon, kvankam estas kelkaj rekoneblaj vortoj kiuj venas el eŭropaj lingvoj, ekzemple 'kantor pos' por poŝtoŝtanco ('kantoor' estas 'oficejo' en la nederlanda lingvo), 'bisnis' ('business' en la angla lingvo), 'bendera' por flago ('bandeira' en la portugala lingvo) ktp.

Ĉu mi rekomendas Balion? Jes, se vi volas viziti varman insulon kun belaj plaĝoj kaj pejzaĝoj. Tamen, mi preferas kulturon kaj, pro tio, mi kredas ke aliaj aziaj landoj kiel Vjetnamio proponas al vizitantoj pli da historio, arto, kaj muzeoj.



Elefanto en bestĝardeno



Statuo en templo kun ofertoj



Vizitinda rizkampo



Vidi voĉojn

FRANCISKA TOUBALE (MELBURNO)

Mi ŝatas aŭskulti la sufiĉe novan esendon de ABC nacia radio, nomitan “the hub in art” (centro por arto). Pere de ĝi eblas malkovri nekutimaĵojn. Ekzemple kiam mi aŭdis la supre menciitan titolon aŭ “ĥoro en signa lingvo” (sign language choir) aŭ “silenta polifonio” (silent polyphony) mi surpriziĝis kaj demandis min ĉu temas pri iu aranĝo por surduloj. Se surduloj ne povas aŭdi, ili tamen kapablas vidi kaj ne estas novaĵo, ke ĥoroj anstataŭ kanti, movas la korpon kaj ĉefe la brakojn laŭ la ritmo de muziko, kreante sentumojn similajn al la sentumoj naskitaj de muziko.

Fakte “Vidi voĉojn” estas la titolo de ekspozicio, kiu vojaĝas tra Aŭstralio laŭ la iniciato de Francis Parker el la

artmuzeo de Monash Universitato. La celo estas sentigi al la rigardanto la ligon inter la diversaj manieroj sin esprimi, komuniki. Same kiel voĉoj supermetiĝas por krei harmonion aŭ kontraston, same movoj interligiĝas por krei belecon.

La kreaĵo de Angelica Mesiti, en kiu junulinoj nigre vestitaj kun longa hararo sin klinas en diversaj direktoj, memorigas min pri la ondoj sur la maro, pri senfina movo, ĉar ĝi senĉese ripetiĝas. Ĉu ankaŭ kiel la ciklo de la vivo?

Mi senpacience atendas ke la ekspozicio revenu al sia origina loko, probable en Marto aŭ Aprilo 2019. Intertempe eblas kapti ĝin en Mildura, Cairns aŭ Tasmania.

Aviadilo sen fenestroj

FRANCISKA TOUBALE (MELBURNO)

Ĉu vi estas unu el tiuj, kiuj ĉiam sidas apud fenestro en aviadilo kaj ĝojas rigardi pejzaĝon, kiun vi ne povus vidi de malsupre? Sciu, ke inĝenieroj trovis, ke aviadilo sen fenestro estas multe malpli peza, do bezonas malpli da karburaĵo por flugi. Emirates estas unu el la kompanioj, kiuj pretas aĉeti tiujn novajn aparatojn.

Por eviti, ke pasaĝeroj time senti sin en tute fermita loko, tute sen kontrolo pri la pozicio de la aparato, oni antaŭvidas, ke per moderna teknologio, estos videblaj sur la muroj pejzaĝoj, kiuj kreas la iluzion ke la pasaĝeroj tamen povas vidi eksteren.

Finfine la nuna tendenco, en longaj flugoj almenaŭ, estas subigi la kurtenojn ne tre longe post la eniro tiel, ke la pasaĝeroj aŭ dormas aŭ rigardas filmon

sur siaj ekranoj. Tio tre similas al la novaj kondiĉoj.

Mi foje vojaĝis en aviadilo sen fenestroj. Dum la konflikto en Bosnio en la 1990aj jaroj, la franca armeo uzis ĝin por transporti varojn al Sarajevo. Dum aviadilfestoj, mi akompanis infanojn, kiuj neniam spertis flugi en aviadilo antaŭe. La flugo estis mallonga kaj ne estis seĝoj kiel en aviadilo por pasaĝeroj, do tiu sperto ne sufiĉis por komprenigi min kia estos flugo en aviadilo sen fenestro.

Mi ŝatas rigardi ĉu lumas, ĉu noktas tra la fenestro. Foje eblas vidi longdaŭran sunleviĝon aŭ sunsubiron. Mi pensas, ke mi ne estos inter la entuziasmoj, kiuj unuaj spertos la miraklon de neĉesebla “progreso”. Ĉu vi estos?

Frank Banham 1898-1974

TERRY MANLEY (NOVSUDKIMRUJO)



Redaktoro: La Suda Kruco 1929-34;
La Rondo kaj The Australian Esperantist
1940-74

Kiam mi rimarkis la longdaŭran
redaktadon de S-ro Banham mi pensis
estus bone scii iom pli pri li.

Foje mi uzas la retpaĝon de la Nacia
Biblioteko TROVE por eltrovi artikolojn
pri personoj aŭ aferoj en gazetoj kaj
ĵurnaloj enkomputiligaj per la biblioteko.
Traserĉante malnovajn ĵurnalojn sur tiu
retejo mi uzis la vortojn BANHAM kaj
ESPERANTO kaj ekis respondoj el kelkaj
ĵurnaloj.

La unua estis interesa ĉar ĝi devenis
de kampara ĵurnalo *The Canowindra Star*
1918. La mallonga artikolo priskribas
kiel S-ro Frank Banham senkonsciigis
pro bato de ĉevalo. Feliĉe li ne tre
vundiĝis. En artikolo sur la sama paĝo
estas io pri la vendo de farmbieno
nomita "ESPERANTO". Do duobla trafo
sur la sama paĝo, sed mi poste konstatis,
ke estis alia Frank Banham pri kiu oni
raportis.

Aliaj artikoloj, kiujn mia serĉado
malkovris, estas leteroj al redaktoroj de
ESK | paĝo 20 | 132 | septembro 2018

Esperanto

"**E**SPERANTISTS want
their language
taught in all schools in-
stead of French" is mislead-
ing.

Esperanto aims to be-
come the neutral auxiliary
tongue for every man in his
relations with those speak-
ing a language foreign to
him.

Esperantists are pleased
that, by tests with Esper-
anto as a language of intro-
duction to French, peda-
gogues are trying to improve
the results of teaching the
latter.

F. R. BANHAM (Essen-
don).

Letero aperinta en *The Argus* (Melburno)
Merkredon 29a julio 1953, paĝo 2

Melburnaj ĵurnaloj; *The Age*; *The Argus*
kaj *The Melbourne Herald*. Kaj iuj el tiuj
leteroj estis sufiĉe longaj kaj iel temantaj
pri Esperanto. Kaj ĉiuj verkitaj de Frank
Banham.

Nelonge post la morto de S-ro
Banham, en la Oktobra 1974-a eldono
de *The Australian Esperantist* mi trovis la
veron pri la artikolo en *The Canowindra*
Star kaj kalrigon pri la leteroj en la
ĵurnaloj ĉar en tiu numero oni reprenis
membiografion de Frank.

Mallonge:- S-ro Banham naskiĝis en
Suffolk, Anglujo en 1898 kaj enmigris
Aŭstralion sur la lasta (ĝis la fino de la
Mondmilito) enmigradŝipo *Demosthenes*
el Anglujo al Aŭstralio en 1914. Li venis
kiel junulo, 16jaraĝa kaj verŝajne ne

kun familianoj. Li laboris diversloke apud kaj en Melburno kaj diverslabore dum 5 jaroj. En melkejo, restoracio, konfitaĵfabrikejo, kaj similaj laborejoj li vivsubtenis sin. En 1919 li alliĝis al Metodista Biblia klaso, kie la gvidanto kuraĝigis lin studi pri literaturo, gramatiko, verkado, resumado ks. kun la celo dungiĝi ĉe la sama laborloko kiel li, nome *The Age*, ĵurnalo en Melburno. Li sukcesis plenumi la studkondiĉojn kaj komencis labori ĉe *The Age* en 1919. Li laboris tie kiel kopiisto, provaĵkorektisto kaj ĉefkorektisto ĝis sia emeritiĝo en 1963.

En 1922 li eksciis pri Esperanto de linotipisto, William Vogt, ĉe *The Age*. Frank memlernis kaj diplomiĝis kun honoro de BEA (Brita Esperanto-Asocio) en 1926. En Majo 1929 li aĉetis redakti la Aŭstralian gazeton "La Suda Kruco". En 1930 irinte al la klubo en Russel Strato, li renkontis sian estontan edzinon F-inon Hilda Dawes. Laŭ konsento ili decidis kunlarni kondiĉe, ke ili nur parolu Esperanton. Post ses monatoj ili gefianĉiĝis!

Oni rimarkas en *The Australian Esperantist* ciferojn pri "Mezurado de presaĵo". Temas pri tekniko aranĝi tekston por presi. Frank Banham estis vere spertulo pri la aranĝo kaj presado de gazetoj laŭ metodoj nun malmodaj. En tiu fako li laboris kaj dum longa tempo estis preta helpi la eldonadon de gazeto por la Aŭstraliaj Esperantistoj.

Ne nur kompilante la modelon de ĉiu numero de la gazeto, li ankaŭ verkis multon:- ĉefartikolojn; librocenzojn; prigramatikajn kaj literaturajn komentojn; poemojn; tradukojn; anekdotojn kaj ŝercojn. Li

estis ekzamenisto dum mutaj jaroj kaj ĉefekzamenisto inter 1968-74. Li gvidis tradukajn kursojn koresponde. Li ankaŭ verkis por eksterlandaj gazetoj kaj tradukis. Unu el liaj tradukoj trovis lokon en la '*Angla Antologio*'. Li kunlaboris por eldoni la libron "*Enciklopedio de Esperanto*" en 1933. Inter 1979-96 estis tri eldonoj da libro verkita de li "*A translation course in Esperanto: for advanced students.*" Ofte li estis ĉefparolanto dum Zamenhof-festoj. Oni ne vidas lian nomon inter la komitatanoj de AEA aŭ ŝtataj organizoj sed li vere laboris multe dum siaj 52 jaroj kiel Esperantisto. Li elektiĝis kiel Fratulo de AEA en 1974.

Aldonaj memoroj pri Frank Banham de Marcel Leereveld:

Frank laboris kiel ĉefkorektisto ĉe la ĵurnalo *The Age* en Melburno, dum tre multaj jaroj. Li do estis perfekta en la angla lingvo, sed ankaŭ en la germana kaj en Esperanto, kaj tre bona en la franca. Ĉar li ĉiam laboris dum la nokto, li tre malofte vizitis la kunvenojn de la melburna Esperanta grupo. Mi renkontis lin plurfoje en la jaro 1953 kaj en la jaroj post 1960. Mi vizitis lian hejmon kelkfoje, ĉar mi petis lin korekti paĝon da angla por libreto kiun mi estis tradukinta el la nederlanda al Esperanto. Ĝi temis pri la origino de la homaro, kaj estis verkita de marksisto kaj profesoro de astronomio. Banham, kies Esperanto ja estis perfekta, verkis ekzercolibretojn por progresintoj. Dum ferioj li kelkfoje lekciis en kongresaj Esperantokursoj.

Izolitaĵoj Homoj

Aŭstalianoj verkintaj en Esperanto

TREVOR STEELE (ADELAJDO)

Nia lingvo estas vere kultura fenomeno: kio estis iam nur projekto en la kapo de juna viro, estas nun lingvo uzata por ĉiuj bezonoj de la homo sur ĉiuj kontinentoj. Oni amindumas Esperante, oni sendas faktojn Esperante, oni protokolos Esperante, oni organizas kongresojn kaj konferencojn Esperante, oni kantas Esperante, kaj kompreneble oni kverelas Esperante. Jam kvin generacioj uzis Esperanton, ĝi estas eĉ la ĉiutaga lingvo por iomete kreskanta nombro da homoj.

Sed kio restas de tiuj generacioj? Estas kelkaj sonregistraĵoj: eĉ la voĉon de Zamenhof oni povas aŭskulti, konservitan por ĉiam per foje malbona, foje ne malbona ilo. Sed grandparte nia kontakto kun tiuj mortintaj generacioj, kaj samtempe nia trezoro montrinda al la cetera mondo, estas nia literaturo. Povas esti, ke postaj generacioj trovos aliajn manierojn manifesti nian lingvon, sed mi suspektas, ke nia literaturo, kaj unualoke nia beletra literaturo, longe restos nia plej potenca vivosigno, nia identigilo, la esprimo de nia unika internacia kulturo.

Ĝis nun la plimulto da Esperantistoj estis kaj estas eŭropanoj. Do ne surprizas, ke grandparte la verkistoj en nia lingvo estis kaj estas eŭropanoj. Oni povas eĉ paroli pri diversaj “skoloj”, grupoj da homoj, kiuj vivis sufiĉe proksime unu al aliaj por reciproka influo. Ni memoru la parizanojn en la 1930-aj jaroj, inter kiuj Raymond Schwartz elstaris: ili formis la tiel nomatan “Verdkatan Kabaredon”, kiu foje altiris eĉ neesperantistojn. Estis ankaŭ la Budapeŝta Skolo, kies plej konataj membroj estis Kalocsay kaj Baghy; ili du ofte malkonsentis pri tio aŭ tio ĉi, sed ili certe influis unu la

alian kaj aliajn homojn en tiu medio. Iom poste venis la Skota Kvaropo: Auld, Rossetti, Dinwoodie, kaj Francis; ili kune eldonis epokofaran poemkolekton, kaj certe lernis unu de aliaj.

Iam mi havis la plezuron renkonti la anojn de la tiel nomata “Ibera Skolo” – la hispanojn Jorge Camacho, Miguel Fernandez, Abel Montagut, kaj la portugalon Gonçalo Neves. Mi observis, kiel ĝoje kaj fruktodone ili ĵetas ideojn inter si, kaj mi bedaŭris, ke mi mem kiel verkisto estas izolita (krom ke mi nun havas edzinon, kiu forte interesiĝas pri miaj libroj). Sed oni longe atendas, ĝis aperos iu “Melburna Skolo” aŭ “Kvinslanda Kvinopo”, eĉ iu “Aŭstria-Novzelanda Grupo”.

Sed ja estis kaj estas aŭstrialianoj, kiuj dediĉas tempon al kreado de literaturo. Mi ne parolos pri la Aŭstria Antologio, kolekto de juveloj el la anglalingva literaturo de ĉi tiu lando aperinta en esperanta traduko. Estas belaj pecoj en tiu antologio, sed ne temas pri Esperanto-originaloj.

Sed kion signifas verki? Ĉu artikoloj verkitaĵoj por, ekzemple, *MONATO* aŭ *LA ONDO DE ESPERANTO*, *LITERATURA FOIRO*, *BELETRA ALMANAKO*, *LAGAZETO*, *LA KANCERKLINIKO*, la malaperinta *FONTO*, aŭ alia tia periodaĵo apartenanta al nia literaturo? Ĉu multjara redaktado donas la rajton sin nomi “verkisto”? Ĉu niaj esperantologoj estas verdire verkistoj?

Nu, la plej impona verko ĝis nun en la angla lingvo pri la literaturo de Esperanto estas tiu de Geoffrey Sutton, *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto 1887 - 2007*, eldonita en 2008. En tiu vasta verko ne estas multo pri aŭstrialiaj verkistoj. Donald



Maldekstre: Ron Gates,
Dekstre: Donald Broadribb

Broadribb estas citita diversloke, sed nur kiel recenzanto, ne kiel verkisto. Ron Gates ricevas du trionojn de paĝo, Ken Linton malpli ol duonpaĝon, Len Newell kelkajn paĝojn, kaj iu Trevor Steele eble 10 paĝojn. Alivorte, Sutton havas rigoran kriterion: nur evidentaj beletraĵoj en klasika difino trovas lokon en lia verkego.

La verdikto estas iom pli milda, se vi turnas vin al Josip Pleadin, *Ordeno de la Verda Plumo*, kiun li subtitolis “leksikono pri esperantlingvaj verkistoj”. En tiu libro 17 aŭstralianoj estas nomitaj: Frank Banham; Bob Felby; Don Broadribb; Margaret Chaldecott; Ron Gates; Frank Halls; Ralph Harry; Fay Koppel; Ken Linton; Len Newell; June Perkins; James Pyke; Edith Sinnotte; Trevor Steele; L. E. Thomson; Franciska Toubale; kaj Wojciech Zbik. Sed kompreneble ne ĉiuj en la listo kontribuis samkvante al la originala literaturo. Kaj tiu listo ellasas kelkajn el la plej interesaj verkoj de aŭstralianoj.

Do iom konfuza demando, kiuj estis



Maldekstre: Bob Felby,
Dekstre: Ralph Harry



Maldekstre: Ken Linton,
Dekstre: Len Newell

aŭstraliaj verkistoj, kaj estas nenia komuna fadeno inter iliaj verkoj: neniu influis alian, ĉiuj verkis kvazaŭ en vakuo. Mi decidis do elekti plurajn verkojn, ĉu beletrajn ĉu ne, kaj paroli al vi pri la enhavo kaj la stilo. Miaj propraj verkoj okupas pli da spaco en la enciklopedio de Sutton ol ĉiuj aliaj verkoj de aŭstralianoj kune, sed mi ne volas komenti pri miaj verkoj. Unue pro tio, ke mi preferas lasi al aliaj homoj juĝi miajn librojn, kaj due pro tio, ke mi verkis tiom, ke iom plena diskuto pri miaj libroj postulus multe da tempo.

^^^^

Surprizis min ekscii, ke la unua romano de virino en Esperanto estis verkita de homo, kiu pasigis pli ol duonon de la vivo en Aŭstralio. Ŝi estis Edith Alleyne Sinotte (1871 – 1947), naskita en Liverpolo, Anglio, kiu migris al Aŭstralio en 1894. Ŝi estis do preskaŭ pionirino de la lingvo kaj multe aktivis en Melburno. Ŝi persone renkontis Zamenhof dum la kongreso en Ĝenevo en 1906. Ŝia romano *Lilio* gajnis ioman reputacion, sed aperis dum la Unua Mondmilito, kiam homoj havis aliajn zorgojn. *Lilio* certe estis la unua beletraĵo aperinta en Aŭstralio.

Mallonge pri la enhavo: la verko spegulas tiamajn sociaj tabuojn kaj valorojn: timo pri bastarda deveno povis veni tutan vivon.

Lilio estas mezklasa virino (en tiu tempo mezklasaj virinoj kutime ne laboris, fakte estis hontaĵo, se ili devis sin vivteni per laboro). Ŝi edziniĝas al sia vera amo, s-ro Ĉester, kaj



Edith A. Sinotte

naskas du gefilojn. S-ro Ĉester iras al Usono kun la intenco sekvigi sian familion, sed li mortas tie. Lilio funkciigas apudmaran pensionon. Ĉambroluanto s-ro Ŝton enamiĝas al Lilio kaj bone traktas ŝiajn gefilojn, do fine ŝi edziĝas al li. Sed s-ro

Ŝton estas jam edzo. Li kredis, ke lia edzino mortis. Sed kiam la edzinzo aperas, Lilio tuj forsendas s-ron Ŝton.

Sed nun venas la centra evento de la romano: Lilio naskas filinon, kiun donis al ŝi s-ro Ŝton. Lilio donas al la filineto la nomon Ĝojo, sed dum la tuta vivo ŝi provas kaŝi de aliaj homoj la hontindan cirkonstancon de la koncipiĝo de Ĝojo.

Estas pluaj familiaj komplikaĵoj, kaj ĉiam Lilio estas la nobla suferantino. Sed kiam Ĝojo plenkreskas kaj fariĝas fama violonistino kaj same fama komponistino, la rakonta fadeno de la aŭtorino dumtempe cedas al longaj ĉapitroj pri la teorio de muziko. Sendube ne tute sen intereso, sed tiuj ĉapitroj vere ne rilatas al romano.

Kaj ĝisfine Lilio suferas, sed noble. La lastaj paĝoj de la libro povus esti ĉapitro el libro pri spiritismo. Lilio mortas en odoro de sanktulineco.

Certe moderna leganto trovos la tonon tro sentimentala. Do ĉu la verko estas senvalora? Ĝi ja havas historian valoron. Sed ne nur: Edith devis uzi la Esperanton de tiuj tre fruaj jaroj, kiu estis malpli riĉa ol nia hodiaŭa lingvo, kaj ŝi ofte elturniĝis sukcese: *rimedoplena, premaera; preĝpeti; atentotire; vortpenetraĵoj*.

Laste mi citu al vi frazon, kiu montras, ke Edith kapablis bone redoni scenon, kiun ŝi mem spertis:

...la fantazio prezentis antaŭ ŝi la furioze ĵetatan akvon, la ŝtonegajn bordkrutaĵojn... la sablan baron apud la enmariĝo de la rivero, la

timplenan homamaseton atendantan la morton sur ŝipo balanciĝanta senpove, dum la vento blovadas kaj la ondegoj portadas ĝin jen al unu jen al alia el tiuj lokoj de danĝero.

^^^^^

Pli moderngusta estas verko de du aŭtoroj, unu aŭstraliano, kiu sin nomis Delsudo (fakte temis pri Arthur Maurice Hyde), kaj la alia finno, Lauri Laiho, vizitinta la kontinenton. Ĝi estas bonstila verko kun jam historia valoro. La titolo estas *Aŭstralio, lando kaj popolo*, aperinta en 1927 ĉe la germana kompanio Ferdinand Hirt kaj Filo en Leipzig. Kiam oni legas la libron nun, oni vere ricevas bildon de malaperinta Aŭstralio, kiu tamen en sia geografio multe similas la nunan landon.

La aŭtoroj komencas per trajnekspedicioj aŭ ŝipkrozoj inter la ĉefurboj de la granda kontinento. Kvankam la bildoj de la urboj mem estas nun grandparte eksaj, nuntempa vojaĝanto konstatus, ke la cetera pejzaĝo malmulte ŝanĝiĝis dum la lastaj 80+ jaroj. Ni sekvu la aŭtorojn, dum ili eniras la havenon de Sidnejo:

La ŝipo trairas breĉon en la krutaĵo, kaj sin malfermas panoramo ĉarma kaj pitoreska. Komplika haveno kun serio de golfetoj kaj verdaj kaj domkoovritaj promontoroj. Vigla trafiko de havenaj kaj oceanaj ŝipoj. Trankvilaj vilaoj; ĉe multaj el ili, herbotapiŝo eĉ ĝis la akvorando. Ekvido de pli densaj kvartaloj, konfuzaj konturoj de vasta urbo; la ŝipo sin turnas, la verda ĉarmo malaperas – oni estas en vere industria golfeto kun bruo kaj fumo de mondhaveno. Kiel la haveno, ankaŭ la urbo donas impreson de komplikeco, kun nelarĝaj, malrektaj stratoj, hazarde kreskintaj, kontraste al la memkonscia rektanguleco de Adelajdo kaj Melburno. Bruaj, eĉ bruegaj stratoj, trotuaroj densaj per homoj, ŝoseoj densaj per veturiloj. Kelkaj imponaj konstruaĵoj, kies arkitekturo eble estus admirinda, se el la mallarĝaj stratoj oni povus ĝin vidi.

Do la aŭtoroj kapablas bone pentri scenon. Sekvas ĉapitroj pri politiko, kulturo, sporto, historio, kaj aparta ĉapitro kun la titolo “Sancoj de enmigranto”. Tiu ĉi ĉapitro pritraktas la

perspektivojn por homo, kiu emas enmigri en Aŭstralion, sed apenaŭ estas mencio pri unu necesa kondiĉo, nome ke tiu enmigronto estu eŭropa aŭ “blanka”.

Ĝenerale la komentoj de la du aŭtoroj baziĝas sur akuta observado, kaj ne malofte ili atentigas pri moroj amuzaj al neaŭstraliano. Mi rekomendas la verkon kaj enhave kaj lingve. Sed la lasta ĉapitro ... nu, mi ne komentu, mi simple iomete citu:

[La indiĝenoj] prave estas rigardataj kiel la plej malalta raso sur la tero ... Se blankulo ne estus alveninta, ili ĉiuj ankoraŭ verŝajne restus en prahoma stato... Eĉ se estus ekzistintaj bestoj taŭgaj por domservado, estas kredeble, ke Aŭstraliano ne estus farinta ian uzon de ili ... Vere li havis nenian koncepton pri la interrilatoj inter la semo kaj planteto, sed li simple kredis, ke planto kreskas dank' al lia propra magia povo... Se oni povus paroli pri lando, kiun blankuloj pro inertece de nigruloj rajtis venki, tiu lando estas Aŭstralio.

Kaj tion skribis esperantistoj bone edukitaj, homoj kun kelkrilate universala vidpunkto ...

AAAAA

Libreto ne menciita aŭ de Sutton aŭ de Pleadin estas de Cedric Carlyle Cowling, kiu loĝis en Christ College en Hobarto en la 1930-aj jaroj. Li estis protestanta pastro kaj evidente iom profunde esploris la temon de sia verketo, kiu havas la titolon *Pri la iamaj tasmanianoj*. Kompare kun la desupra rigardo al la aŭstraliaj aborigenoj en la libro de Delsudo kaj Laiho, Cowling ĝenerale penas kompreni la situacion de siaj priskribatoj kaj ne tuj nomi ilin simple primitivuloj aŭ “prahomoj”. La verko certe havas sian valoron kiel monografio pri popolo ĝenerale forgesita. Jen la komenco:

Tasmanio estas insulo kuŝanta sud-oriente de Aŭstralio; sed en iu estinta epoko ĝi estis kunigita kun Aŭstralio. Tamen, en la daŭro de jaroj (kredeble en la paleolita aŭ ŝtona epoko) la kunigaĵo foriĝis rezulte, ke la markolo de Bass nuntempe malkunigas la du landojn.

Antaŭ ol tiu ĉi disiĝo okazis, troviĝis en

ambaŭ partoj homoj sampopolaj; sed poste la tasmanianoj sin trovis deigitaj de la aliaj, kaj tute sen ia ebla rilato kun aliaj homoj. Male, en Aŭstralion enmigris aliaj popoloj kaj bestoj el la nordo tiel, ke iom post iom la aŭstralianoj evoluĉis kaj jam ne similis multe la tasmanianojn, kiuj preskaŭ tute ne evoluĉis.

Nu, ŝajnas al mi, ke pastro Cowling estas diligenta kaj konsciencema homo, por kiu Esperanto ne estas ĉiutage uzata lingvo; la lingvaĵo estas ĝenerale senerara sed iom “libreca”, ne tre flua. La aŭtoro skribas pri la manko de *evoluo* ĉe la tasmanianoj. Do ankaŭ li, malgraŭ honesta intenco gajni simpation por la malaperinta raseto, sinteno probable malofte en Aŭstralio en la 1930-aj jaroj, juĝas el la vidpunkto de eŭropanoj, kiuj estis kompreneble la plej evoluĉinta “raso” tiutempe – almenaŭ siaopinie.

La plej interesa parto de la libreto miajuĝe estas tiu pri Robinson, la homo, kiu gajnis la fidon de la tasmanianoj en ilia lasta etapo kaj kondukis ilin al insuloj en la markolo Bass. Robinson estis certe kuraĝa homo – li iris sen armilo inter homojn, kiuj luktis por sin savi kontraŭ invado – sed finfine la rezultoj de la agado de Robinson estis mizera formortado de preskaŭ la tuta aborigena popolo en lokoj, kie ili sentis nenian ligon al la tero, sed almenaŭ ne plu ĝenis la blankulojn per sia ekzisto. Eble mia opinio pri Robinson estas maljusta: sed se vi legos la broŝuron de Cowling, vi povos mem juĝi.

La fino de la libreto estas – kaj mi antaŭtimas, ke vi perdiĝos en la gramatika strukturo:

Tiel finiĝis tre interesa popolo, sed interesatoj povas ankoraŭ renkonti ĝiajn duonblankajn idojn kaj vidi lokojn kie ĝi pasloĝis, samtempe aspekte kiel vidis ilin la nigruloj, ĉar ĝis nun multaj regionoj de Tasmanio restas senhomaj kaj en sia primitiva sovaĝa stato; sed iom post iom la lokoj cedas sian primitivecon al la progreso de civilizado, kaj post nemulte da jaroj, oni jam ne povos vidi eĉ la postsignojn de nia formortinta popolo.

.....DAŬRIGOTA.....

Ekskurso al la insulo 'Filo de Krakatoa'

KAM LEE (HOBARTO)



Marton, 2018, mi kun grupo de Esperantistoj iris al la fama vulkana insulo, Filo de Krakatoa, kiu ankaŭ nomiĝas Pulau Anuk Krakatoa. Frumatene, ni iris okcidenten 50 km per du motorboatoj el Anyer, kiu estas marborda urbo en la okcidenta parto de Javo. La vojaĝtempo estis du horojn kaj ni alvenis al plaĝo kiu havis nigran sablon. Jen ni estas ĉe la insulo "Filo de Krakatoa". Kelkaj aliaj grupoj estis ĉi tie kaj oni permesas dormi nokte sur la insulo.

Ni komencis piediri sur la insulo kaj la unua parto de la ekskurso estis piediro laŭ 300m longa piedvojo kiu iris tra mezdika arbaro. Poste ni piediris pluan 300m laŭ kruta ŝtonplena piedvojo kaj ni alvenis al rigardejo.

La lasta etapo de la veturo estis piediro laŭ mezkruta piedvojo, kiu situas sur

la supro de kresto. Ni ĉeestis ĉe la dua rigardejo, kiu estas la plej alta loko de nia ekskurso kaj havas proksimume unu trionon da la alteco de la vulkano. La dua rigardejo, pro risko de erupcio, estas ankaŭ la plej proksima permesata loko al la kaldrono, kiu estas 600 metrojn for kaj havas altecon de 324 metroj. La plej lasta signifa erupcio de Filo de Krakatoa estis Februaro, 17a-19a, 2017.

Oni povis vidi fumon eliri el la kaldero kaj sude oni povas vidi Rakata-n Insulon (ankaŭ nomita Krakatoa Insulo) kaj ĝiajn tre krutajn klifojn. La minimuma distanco inter Rakata Insulo kaj Filo de Krakatoa Insulo estas 1.7 km. Interesa observado estis, ke en la tero mi faris malgrandan truon, kiu estis 15 centimetrojn profunda. Mi trovis, ke la temperaturo de la roktavolo sub la surfaco de la grundo



Elveno el Anyer. Vidata estas mara konstruaĵo supoze rilate al fiŝkaptado.



Celebro pro vido de la Insulo "Filo de Krakatoa". Jes certe, la vulkano ekzistas!



Ni proksimiĝas al la insulo "Filo de Krakatoa". Klare vidata estas fumo eliranta el la vulkano. La insulo en la dekstra flanko estas parto de Malgranda Krakatoa Insulo (ankaŭ nomita Pulau Krakatau Kecil).



Ĉe la limo inter la arbaro kaj la pli alta dezerta regiono de la vulkano. Neniaj plantoj estis vidataj preter ĉi tiuj arboj.



Laŭ la kruta piedvojo al la unua rigardejo. Bonŝance, la ĉielo estis meze nubkovrita kaj la vetero ne estis tro varmega.



Ĉe la dua rigardejo, kiu situas okcidenta de la kaldero. Ni estis ankaŭ ĉe la plej proksima permesita distanco al la kaldrono. Certe ĝi estis memorinda momento.



Reveno malsupren laŭ la piedvojo al la unua rigardejo. En la fono estas Rakata Insulo, kiu lokas sude de Filo de Krakatoa Insulo.



Vido de la unua rigardejo kaj la kaldrono en la fono. La amplekso de la koloroj de la vulkanaj rokoj estis ruĝaj ĝis nigraj.



Vido de la nordorienta flanko de la insulo.

Oni povas vidi la distingan bordon inter la arbaro kaj rokaj regionoj. Estas neniom arbarojn en la okcidenta, plej suda aŭ plej norda marbordo de ĉi tiu insulo.

estis signife pli varma. Tia fakto subtenas, ke vulkana agado sur la insulo estas tre lastatempa.

La interrilato inter la originala insulo de Krakatoa kaj la insulo “Filo de Krakatoa” estas interesa. Rakata Insulo kontraste al Filo de Krakatoa Insulo estis parto de la originala Krakatoa Insulo, kiu havis areon de proksimume 50 km² kaj enhavis tri vulkanojn. Perboewatan estis lokita ĉe la plej norda parto de la insulo kaj estis 120m alta. Danan lokis ĉe la mezo de la insulo kaj havis altecon de 450 m. Mt Rakata lokis ĉe la suda parto de la insulo kaj ĝi havis altecon de 820 m.

La fama vulkana erupcio de Krakatoa Insulo dum 27a de Aŭgusto 1883, fakte estis kvar erupcioj.

La unua erupcio okazis je 5.30 atm ĉe Perboewatan. La dua erupcio okazis dum 6.44 atm ĉe Danan. La tria erupcio okazis je 10.02 atm ĉe Danan kaj ĝi estis la plej laŭta eksplodo, kiu ankaŭ estis aŭdata en Perto, Aŭstralio, 3,110 km for. La laŭteco de la erupcio, kalkulite estis 180 db, kiu estas la plej laŭta sono aŭdita en historiaj tempoj.

La kvara erupcio okazis je 10.41 atm ĉe Mt. Rakata, kiu nuntempe ekzistas. Perboewatan kaj Danan sinkis en la maron, ĉar la norda kaj centra parto de la insulo estis super la magma ĉambro.

La erupcioj kaŭzis malaperon de 70%



Unu el la du motorboatoj uzataj en la ekskurso.

da la areo de la insulo kaj la forĵeton en la atmosferon de 25 kubaj kilometroj da materialo. Tiom da volumeno egalas preskaŭ al trioble la volumenon da la videbla parto de la Rokego de Ayer (Uluruo)!

La forĵetita materialo konsistis plejparte el magmo el la magma ĉambro kaj relative nur malgranda kvanto da la tiama vulkano.

Dum multaj jaroj post la erupcio, la loko norde de Rakata insulo estis maro, sed en 1927, aperis la vulkana insulo “Filo de Krakatoa” La alteco de la vulkano kreskis kaj dum 1927, 1933, 1950, 1977, 1992, 2005 kaj 2018, ĝi havas la altecon de 9m, 67m, 138m, 181m, 250m, 300 kaj 324 m respektive. La originala 450m granda Danan vulkano estis lokita sur la plej suda regiono de la insulo, kaj ĝi estis 1 km sude de la kaldero de la Filo de Krakatoa.

Ni revenis al la boatoj kaj ni veturis kontraŭhorloĝe ĉirkaŭ la insulo. Unue, ni vidis partojn de la marbordo, kiuj estas kovritaj de arbaro. Poste ni vidis dezertan marbordon, pro ĉeesto de granda lafrivero. Pro ialo, plej multe de la marbordo estis dezerta.

Ni iris al apud insulo kaj ni naĝis kun spirtuboj. En la akvo, oni povas vidi multajn fiŝojn kaj koralojn, kiuj eble estas du dek metrojn malsupren.

Ni revenis al Anyer kaj hodiaŭ certe estas memorinda tago.

Midaso

TOM O'GRADY (KVINSLANDO)

La plej riĉa reĝo en Antikva Helenujo estis lordo de negranda, sed tre fekunda lando. Li havas ĉion, kion homoj povus bezoni, eĉ pli. Kaj kian belan palacon! Tiom da eburo, ebono kaj arĝento, kvankam ne tiom da oro, kaj tion la reĝo tre bedaŭris. Lia nomo estis Midaso.

Iufoje, en siaj grandaj ĝardenoj, li trovis, kuŝantan sur la grundo en ebriaĝa dormo, maljunulon, iel apartigitan de sia kunfestantoj. Li estis Sileno, amiko de Dionizo, dio de vino. Midaso prizorgis lin, kaj resendis lin, nutrita, kaj ornamita per rosoj, al Dionizo.

Tiu estas tiom feliĉa rehavi sian kameradon, ke li aperis al Midaso en ties ĝardeno kaj diris: “Vi faris bonan komplezon al dio, kaj mi donas al vi dian dankon. Vi rajtas havi iu ajn kvaliton kiun vi volas. Elektu! – sed zorgu!”

Ravita, Midaso kriis: “Mi ja scias! Mi volas, ke ĉio, kion mi tuŝas, ŝanĝas en oron!”

“Ho ve! Donita!” Diris la dio.

Apenaŭ paŭzante por danki, Midaso forkuris por provi la donacon. Kaj jen! Ho ĝojo! Ĉiu tigo, folio, floro kaj ŝtono, kiun li enmanigis estis tuje pura oro!

Sed nun li sentis sin tre malkomforte, ĉar li eksciĝis, ke siaj ŝuoj kaj vestoj estantaj el oro, estas tre malflekseblaj. Malfacile enirante la palacon, li nudigis sin. Sed la servistoj, pro timo fariĝi oraj statuoj, ne volonte proksimiĝis al li. Kaj kiam la nuda reĝo sidis ĉe sia tablo (nun tiom riĉe ora), li baldaŭ sciis, ke neniu ajn manĝaĵoj aŭ trinkaĵoj iel ajn utilas lin.

Post mizera nokto sur ora lito kun oraj kovriloj, Midaso, senvesta kaj tremanta pro malvarmo, kuris en la ĝardenon al la loko kie Dionizo aperis kaj kriegadis ĝis la dio revenis. Tiam li petadis!

“Jes”, diris la dio. “Tiaj ofte estas la karaj deziroj de homoj, sed ĉifoje mi havas kuracon por vi. Iru al la fonto de la rivero Pactolo, kaj tie banu vin. Tiu pura akvo

forviŝos mian donacon.”

Alifoje apenaŭ paŭzante por danki, Midaso forkuris por trovi tiun riveron kaj sekvi ĝin ĝis ĝia fonto, ankoraŭ nuda, sen manĝo kaj trinko, kaj lasante spuron de ora piedmarkoj! Post plejeble mizera vojaĝo li stumblis al la fonto kaj enplonĝis. Nur tiam li estas kuracita - kaj ankaŭ kuracita de sia or-avido!

Sed Midaso havis eĉ alian malfeliĉan sperton kun alia dio. Iam poste, dum li vagis en la arbaro, li ekvidis du diojn, Pajno kaj Apolono. Ili kverelis pri kiu pli bele muzikas – Pajno per sia kelktuba ŝalmo aŭ Apolono per sia multkorda ora liro. Vidinte Midason, ili prenis lin por ĵuĝi inter si, dum ili konkuris. La reĝo ne havis muzikan sperton, sed ĉar li devis, li aŭskultis la belan muzikon de ambaŭ, kaj post longa paŭzo de pensego, li donis la premion al Pajno! Tiu feliĉegiĝis, sed Apolono, dio ĉiam fama pro sia muziko, estis nigra-brova.

Dum Midaso prudente rapidis for, li sentis ion strangan ĉe la flankoj de sia kapo. Li palpis, kaj jen! Hororo! Du longaj, harozaj oreloj. Ili estis azenoreloj, adiaŭa donaco de Apolono!

Li nepre ne volis ke iu ajn vidu ilin, kaj ŝtel-irintis la palacon. Li trovis kaj surmetis kuriozan, malnovan kapveston, similan al turbano.

Tion li devis porti ĉiam por konservi sian sekreton, malgraŭ la miroj de ĉiuj korteganoj. Sed *unu* devis scii – lia barbiro! Tiun li silentigis sukcese per teruraj minacoj. Sed la sekreto, kiun neniu alia sciis, tiom torturis la babiron, ke finfine li devis diri ĝin al iu aŭ eĉ io! Do iam li iris nevidata al apuda riverbordo kaj tie fosis truon inter la fragmitoj kaj flustris en ĝin: “Midaso havas azen-orelojn.”

Tamen, estis neatendita rezulto: Kiam ajn brizo blovas ilin, la fragmitoj mem klaĉis: “*Midaso havas azen-orelojn.*”

Sinteza Biologio

DONALD ROGERS (NOV-ZELANDO)

En sinteza biologio, oni rigardas vivon kiel maŝinon, por trakti problemojn pri sano, energio kaj la medio. Sintezaj biologoj emas kunlabori, kunhavigante informon kaj ilojn laŭ la sama etoso kiu karakterizas la movadojn por liberaj programaroj, kaj libera aparataro.

Elstaras en la kampo aŭstraliano Craig Venter. Lia teamo en 2010 kreis la unuan sintezan vivoformon – kopion de la bova bakterio *Mycoplasma mycoides*. Ties DNA-kodojn oni tajpis en komputilon, konstruis en testotubo, kaj metis en vakigitan ujon de alispeca bakterio. En 2016 Venter anoncis novan version de tiu sinteza bakterio kun 473 genoj, la minimuma nombro necesa por ke la bakterio vivu. (Proksimume duono de la unua versio). Li esperas ke la reduktita DNA servos kiel la bazo de io utila, eble por produkti drogojn, aŭ kulturitan viandon.

Sintezaj biologoj strebas konvinki la socion pri sia vizio por pli lerta, pli verda, pli daŭrigebla mondo. Oni evoluigas projektojn laŭ ciklo de planado, konstruado, testado. Ofte neatenditaj DNA-interagoj kaj tokseco kaŭzas misfunkciadon ĉar ili ne tute komprenas la uzatan DNA.

La plej sukcesa projekto ĝis nun estas la sintezado de artemisinino, la ŝlosila ingredienco en nuntempaj drogoj kontraŭ malario. En la 1970-aj jaroj, Tu Youyou, ĉina sciencisto, malkovris ke ekstraktaĵo el la planto absinto efikas kontraŭ malario. Ŝin inspiris skribaĵo pri ĉina tradicia medikamento el 340 p.K. En 2008 Keasling k.a. ĉe Universitato de Kalifornio adaptis la DNA-kodojn de gisto por produkti artemisininon grandskale. Poste la kompanio Amyris adaptis la procedon por produkti biobrolaĵon sufiĉe energidensan

por aviada brulaĵo. Venter ankaŭ celas uzi algojn por produkti biobrolaĵon.

Claudia Vickers, ĉe Universitato de Kvinslando, uzas giston kaj bakterojn por produkti hidrokarbonojn (ekzemple farnesenon) por produkti parfumojn.

Genencor, en Kalifornio, uzis bakteriojn por sintezi izoprenon por kaŭĉuko, anstataŭ uzi nafton.

Arsenic Biosensor Collaboration estas kunlaborado inter sciencistoj en la universitatoj de Cambridge kaj Edinburgh. Ili faras malmultekostan, dependindan teston por arseno en akvo. La elektitaj bakterioj povas senti arsenon je malpli ol 10 partoj en miliardo, la limo por trinkakvo. Kiam ili sensas arsenon, la bakterioj generas laktan acidon, kiu estas facile detektebla per pH-metro.

Timothy Lu (MIT, Usono) celas uzi virusojn por plibonigi la kapablon de la imuneca sistemo lukti kontraŭ kanceron.

Nina Pollak, University of Sunshine Coast, sintezas meduzojn por purigi toksajn poluaĵojn. Ŝi uzas ratajn ĉelojn sur ŝablono el silikona polimero kun la formo de okpetala floro. Ĝi povas naĝi, simile al meduzo, per pulsoj de elektro kiuj kuntiras la muskolojn. La celo estas detruiri venenajn kemiaĵojn.

Ŝajnas ke la eblecoj por sinteza biologio estas senlimaj, do ni atendas multajn novajn utilojn por ĝi.

Referencoj

James Mitchell Crow, *Synthetic Life*, COSMOS 78, pp 34-43, 2018
en.wikipedia.org/wiki/Mycoplasma_laboratorium
en.wikipedia.org/wiki/Artemisinin
eo.wikipedia.org/wiki/Libera_programaro



New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

Bradley McDonald | President

Ivan Pivac | Vice-President

David Ryan | Secretary/Treasurer

Dave Dewar | Assistant Secretary

Committee Members:

Erin McGifford, Chris Krageloh

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.



Australian Esperanto Association

Esperanto House
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | President

Jonathan Cooper | Vice-President

Heather Heldzingen | Treasurer

Esther Parris | Secretary

Committee Members:

Terry Manley, Indrani Beharry-Lall

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.

WHAT IS THIS?

Perhaps you've picked up this magazine by chance and you're wondering, what is this language? It looks like Spanish, doesn't it? But it's not, and it's not Klingon either. This magazine is written in Esperanto. Have you ever heard of Esperanto? Where is it spoken?

Esperanto is a planned language. It's not the official language of any country, but it's spoken in over 100 countries across the world. It's designed to be a second language that everyone can speak. So, if you come across someone from Mexico or Taiwan, you don't have to speak Spanish or Chinese, and they don't have to speak English to you. If everyone spoke Esperanto, we could talk together in Esperanto as equals and we wouldn't have to learn so many languages.

Esperanto is an easy language. Its grammar is regular. It can be learned in much less time than other languages. Have a look inside this magazine – you'll probably be able to make out a few words or get a general sense of some sentences. You can learn Esperanto on the net (we recommend lernu.net or duolingo.com), or from a book, or come to one of our meetings throughout Australia and New Zealand. Also go onto YouTube or Wikipedia. You'll find lots of material there in and about Esperanto.

What can you do with Esperanto once you've learnt it? Well, the world is your oyster. Get in touch with other people who speak Esperanto – chat with them online or go to a congress or cultural event. Even if you stay at home, there are hundreds of books and magazines either written in Esperanto or translated from other languages. There are music CDs, radio broadcasts, even films in Esperanto. People with similar interests who speak Esperanto also get together, such as cyclists, doctors, Rotarians, or coin collectors. There are plenty of opportunities to use Esperanto to communicate with other people throughout the world.

Esperanto will open the world to you – beyond our usual English-language confines.

Interested? See the contact details on the inside back cover.